

JARO I.
N.º II.ª 33

LA SUNO HISPANA

Aliĝo

La protesto kontraŭ reformoj en la lingvon esperantan, verkitan de la eminenta franca propagandanto S.^o de Beaufront kaj presita en nia numero de Majo, atingis plej belan sukceson. Entuziasmajn aliĝojn ni ricevis de multaj signifaj esperantistoj, kies nomaron pro manko de loko ni ne povas enpresii, kaj ankaŭ de kelkaj societoj, nome, ĉiuj grupoj hispanaj kaj la franca de Saint-Claude.

Preskaŭ ĉiuj esperantaj gazetoj ankaŭ konsentis la proteston kontraŭ reformoj kaj tio tre klare elpruvus, ke nia afero estas tre forte enradikita kaj vivoplena, kaj sekve, ke nia lingvo bele floras kaj ekzistas en la mondo, ne timante la atakojn de ĉiuspecaj malamikoj, inter kiuj ni kalkulas la reformistojn, kiuj batalas kontraŭ la prospero de esperanto.

En la unua stato de esperanta disvastiĝo, plej grava celo estas propagandi senĉese kaj senhalte, tio estas, alproksimigi plej multe kiel eble la triumfon de nia afero, la universalan alprenon de nia amata lingvo.

Tion ĉi tre bone komprenis ĉiuj esperantistoj kaj tial turnis nenian atenton al la projektoj de reformoj: la unuanima opinio de la esperantaj gazetoj lasis nenian dubon pri tio.

Adhesión

La protesta contra las reformas de la lengua Esperanto, que hizo el eminente propagandista francés Sr. Beaufront, y que fué impresa en nuestro número de Mayo, alcanzó el más hermoso éxito. Entusiastas adhesiones hemos recibido de muchos significados esperantistas, cuya relación por falta de espacio no podemos insertar, y también de algunas sociedades, á saber, todos los grupos españoles y el francés de Saint Claude.

Casi todos los periódicos esperantistas también han aceptado la protesta contra las reformas, y esto claramente demuestra que nuestro asunto está arraigado fuertemente y lleno de vida, y por consecuencia que nuestro idioma bellamente florece y existe en el mundo, no temiendo los ataques de enemigos de toda especie, entre los cuales contamos á los reformistas, los cuales militan contra la prosperidad del esperanto.

En el actual estado de difusión del Esperanto, el más importante fin es propagar incansablemente y sin detenciones, esto es, aproximar lo más posible el triunfo de nuestro negocio, la adopción universal de nuestro amado idioma.

Esto bien lo comprenden todos los esperantistas y por eso no prestan ninguna atención á los proyectos de reformas: la unánime opinión de los periódicos esperantistas no deja ninguna duda respecto á ello.

Tia konduto saĝa kaj prudenta devas kuraĝigi ĉiujn amantojn de nia afero. Ili ne haltu en la propagando de esperanto: ĝia triumfo ŝajnas pli proksima de tago al tago, kaj estas evidenta post la konstato de la rimarkindaj progresoj faritaj de esperanto en la lastaj jaroj.

Esa conducta sabia y prudente debe animar á todos los amantes de nuestra empresa. Que no se detenga la propaganda del esperanto; el triunfo de éste parece más próximo de día en día, y es evidente á la vista de los notables progresos que ha hecho el esperanto en los dos últimos años.

Bibliografio

Esperanto. Valso de Julio Tantot, muzika verkisto, kaj teatraj kronikisto de la gazeto «Progrés de la Somme» el Amiens. Prezo, 6 fr. por plena orkestro kaj 2 fr. por fortepiano, ĉe la verkisto, 13 rue Henri IV, Amiens, France.

Ame kaj majstre, la aŭtoro verkis tiun belan valson, dediĉitan al nia respektinda samideano sinjoro Julio Verne.

De la pariza firmo *L. Gaumont kaj K.* ni ricevis belan kvardekpaĝan katalogon pri fotografiloj titolitan: *Kontoro ĝenerala de fotografado. Eltiraĵo el ĝenerala tarifo.*

La teksto estas tute redaktita per korekte esperanta stilo, malgraŭ ĝia teknikeco, kaj ornamita per belaj figuroj, kiuj igas pli kompreneblaj ĉiujn pris-kribojn.

Ni tutkore rekomendas la suprenomitan broŝureton al ĉiuj esperantistoj kaj esperas ke ili sin turnos al firmo Gaumont kaj K. por ĉiuj mendoj koncernantaj la fotografarton.

Ni plej tre dankas S.^{on} D.^{on} Dupin, pro lia afableco adresi al ni ekzempleron de bonega *Gvidlibreto pri la Altaj Pirineoj*. Tiu ĉi broŝuro franca verkita kaj publikigita de la «Sindicat d'initiative de

Bibliografía

Esperanto. Vals de Julio Tantot, compositor de música y cronista de teatros del periódico «Progrés de la Somme» de Amiens. Precio: 6 fr. para orquesta completa, y 2 fr. para piano, en casa del compositor, 13, rue Henri IV, Amiens, France.

Con *amore* y magistralmente, el autor ha compuesto este bello Vals dedicado á nuestro respetable colega el Sr. Julio Verne.

De la casa de París *L. Gaumont y C.* hemos recibido un bello catálogo de 48 páginas de útiles para fotografía, titulado *Kontoro ĝenerala de fotografado. Eltiraĵo el ĝenerala tarifo*. (Establecimiento general de fotografía. Extracto de la tarifa general.)

El texto está todo redactado en correcto estilo, á pesar de su tecnicismo, y adornado con bellas figuras que hacen más comprensibles todas las descripciones.

De todo corazón recomendamos el antedicho folleto á todos los esperantistas y deseamos que se dirijan á la casa Gaumont y compañía para todos los encargos concernientes al arte fotográfico.

Agradecemos mucho al Sr. Dr. Dupin la amabilidad de dirigirnos un ejemplar del magnífico *Gvidlibreto pri la Altaj Pirineoj*. Este folleto, compuesto en francés y publicado por el «Sindicat d'ini-

Tarbes et des Hautes-Pyrénées» estas tre interesa; enhavas belegajn naturajn vidaĵojn, in de la nomitaj montoj kaj estos sendube utiloplena al ĉiujn kiujn deziros fari ekskursojn tra la tie bela priskribita regiono.

ciative de Tarbes et des Hautes-Pyrénées» es muy interesante; contiene hermosos paisajes naturales de dichos montes y será sin duda de utilidad completa á todos los que deseen hacer excursiones por la bella región allí descrita.

■ “La vivo de Lazareto de Tormes“

Kutimis la blindulo (mia mastro) starigi apud si kruĉeton da vino, kiam ni manĝadis. Mi rapide ĝin manprenis kaj donis al ĝi paron da silentaj kisoj, kaj revenigis ĝin en ĝian lokon. Sed tio malmulte daŭris, ĉar per la glutoj la blindulo sciis la mankon kaj por konservi senriske sian vinon, neniam poste li detenadis la kruĉeton: kontraŭe, li ĝin mantenadis per la prenilo. Tamen, ne estas magnetŝtono kiu tiom altiris al si la ferojn, kiel mi la vinon, per longa pajlo de sekalo, kiun en tiu celo mi alfaris. Metinte ĝin tra la malfermon de la kruĉeto, kaj suĉante la vinon, mi lasis la ujon... «al la bona nokto». Sed kial la perfidulo estis tiel ruza, mi pensas ke li sentis min, kaj poste li ŝanĝis la procedon, kaj starigis la vinujon inter siaj kruroj, kaj kovris ĝin per la mano, kaj li tiel senriske trinkadis: ĉar mi estis kutuminta je la vino, mi mortis pro mia deziro al ĝi, kaj vidinte ke la pero de la pajlo ne sukcesis nek taŭgis min, mi decidis fari en la fundo de la kruĉo malgranda truon, kvazaŭ fonteton, kaj delikate per tre maldika vaksa buleto ĝin kovri, kaj kiam mi manĝis, ŝajnigante ke mi estis malvarma, mi enmetis min inter la krurojn de la malgaja blindulo por varmigi min ĉe la malgranda fajro kiun ni havis, kaj per ĝia varmo tuj fluidiĝis la vakso, ĉar estis tre malmulta kvanto da ĝi, kaj ekkomencis la fonteto distili en mian buŝon, kiun mi tiel antaŭmetis ke estu malbena la guto kiu perdiĝis. Kiam la malri-

De “La vida del Lazarillo de Tormes“

Usaba (el ciego, mi amo) poner cabe sí un jarrillo de vino cuando comíamos; yo muy de presto le asía, y daba un par de besos callados, y tornábale á su lugar. Mas duróme poco, que en los tragos conocía la falta, y por reservar su vino á salvo, nunca después desamparaba el jarro, antes lo tenía por el asa asido; mas no había piedra imán que trujese á sí el hierro, como yo el vino con una paja larga de centeno, que para aquel menester tenía hecha, la cual, metiéndola en la boca del jarro, chupando el vino, lo dejaba á buenas noches. Mas como fuese el traidor tan astuto, pienso que me sintió, y dende en adelante mudó propósito, y asentaba su jarro entre las piernas, y atapábale con la mano, y así bebía seguro. Yo, como estaba hecho al vino, moría por él; y viendo que aquel remedio de la paja no me aprovechaba ni valía, acordé en el suelo del jarro hacerle una fuente-cilla y agujero sutil, y delicadamente con una muy delgada tortilla de cera tapanlo, y al tiempo de comer, fingiendo haber frío, entrábame entre las piernas del triste ciego á calentarme en la pobrecilla lumbre que teníamos, y al calor de ella luego era derretida la cera, por ser muy poca, y comenzaba la fuente-cilla á destilarme en la boca, la cual yo de tal manera ponía, que maldita la gota se perdía. Cuando el pobrete iba á beber, no hallaba nada, espantábase, maldecíase, daba al diablo el jarro y el vino, no sabiendo qué podía ser. No diréis, tío, que os lo bebo

ĉelo almetis la kruĉeton por trinki, ne-nion trovante, li estis miregegita, li sin malbenis, fordonis al la diablo la poton kaj la vinon, nesciante kio povas kaŭzi tion. Vi ne diros, onklo, ke mi ĝin trinkis, diris mi, ĉar vi ne apartigas el ĝi la manon. Tiom da turnoĵoj kaj tuŝadoĵoj li faris al la vinujo, ke li trovis la fonteton kaj divenis la mokajo. Tamen, li kaŝetis tion, kvazaŭ li ne estas kompreninte ĉion, kaj poste, alian tagon, dum mi trasuĉis sur la kruĉo, laŭ mi kutimis, ne pensante pri la malprofito kiu estis al mi pretiginta, nek ke la malbona blindulo eksentis min, mi sidis laŭ mia kutimo, kaj ricevante tiujn dolĉajn glutojn, estante mia vizaĝo turnita al la ĉielo, iom fermataĵoj la okuloj, por plibone gustumi la bongustan fluidaĵon, ekpensis la incitita blindulo ke nun estas la tempo por vengi sin, kaj per sia tuta forto, altigante per siaĵoj da manoj tiun dolĉan kaj maldolĉan poton, li ĝin ellasis fali sur mian buŝon, sin helpante, kiel blindulo, per sia tuta povo, tiamaniere ke la malfeliĉa Lazaro, kiu pri nenio el tio sin gardis, kontraŭe, kiel alfoje, mi estis senatenta kaj ĝoja, certe ŝajnis al mi ke la ĉielo, kun ĉio kion ĝi enhavas, falis sur min. Tia estis la ekbato, ke ĝi forrabis al mi la sentadon, kaj la kruĉfrapago estis tiel grava, ke la vaspecoj eniris en mian vizaĝon, ĝin rompigante je multe da partoj, kaj disligis al mi du dentojn, pri kiuj mi nun estas sen ili.

Okazis ke ni alvenis al urbeto nomata Almoroz'o, kiam oni rikoltis la vinberojn; vinberisto donis almoze al li aron da ili. ... Ni sidis sur terlimo, kaj li (la blindulo) diris: Mi nun volas esti pri vi donema, kaj ke ni ambaŭ manĝu tiujn ĉi vinberojn, kaj ke vi havu en ili tiom kiom mi. Ni disdividos ĝin tiamaniere: vi deprenos foje, mi alia, se vi promesos al mi ke vi nur ĉiufoje elprenos unu vinberon; mi faros, same, ĝis tiam kiam ni finos ĝin, kaj laŭ tio ne estos trompaĵo. Tiel farita la interkonsento, ni ekkomencis, sed ĉe la dua okazo la perfidulo alie pripensis kaj ekkomencis forpreni po du vinberoj, pripensante ke mi faras same: ĉar mi vidis ke li malplenumas sian proponon,

yo (decía), pues no lo quitáis de la mano. Tantas vueltas y tientos dió al jarro, que halló la fuente y cayó en la burla; mas lo disimuló como si no lo hubiera sentido, y luego otro día, teniendo yo resumado mi jarro como solía, no pensando en el daño que me estaba aparejado, ni que el mal ciego me sentía, sentéme como solía, estando recibiendo aquellos dulces tragos, mi cara puesta hacia el cielo, un poco cerrados los ojos, por mejor gustar el sabroso licor, sintió el desesperado ciego que ahora tenía tiempo de tomar de mí venganza, y con toda su fuerza, alzando con dos manos aquel dulce y amargo jarro, le dejó caer sobre mi boca, ayudándose (como ciego) con todo su poder, de manera que el pobre Lázaro, que de nada desto se guardaba, antes, como otras veces, estaba descuidado y gozoso, verdaderamente me pareció que el cielo, con todo lo que en él hay, me había caído encima. Fué tal el golpe, que me desatinó y sacó de sentido, y el jarrazo tan grande, que los pedazos dél se me metieron por la cara, rompiéndomela por muchas partes, y me quebró dos dientes, sin los cuales hasta hoy día me quedé.

Acaesció que en llegando á un lugar que llaman Almoroz, al tiempo que cogian las uvas, un vendimiador le dió un racimo dellas en limosna... Sentámonos en un valladar, y dijo: Ahora quiero yo usar contigo de una liberalidad, y es que ambos comamos este racimo de uvas, y que hayas dél tanta parte como yo; partillo hemos desta manera: tu picarás una vez y yo otra, con tal que me prometas no tomar cada vez más que una uva; yo haré lo mismo hasta que lo acabemos, y desta suerte no habrá engaño. Echo así el concierto, comenzamos; mas luego al segundo lance el traidor mudó de propósito y comenzó á tomar de dos en dos, considerando que yo debería hacer lo

mi ne kontentis min farante same kiel li, kaj eĉ ekprenis po du aŭ po tri, kaj laŭ mi povis ilin manĝi. Finita la vinberaro, li estis iom da tempo kun la trunketaro en la mano kaj ŝvingante la kapon, li diris: Lazaro, vi trompis min, mi juros ke vi manĝis la vinberojn po tri. Mi ne manĝis tiel, mi diris, sed kial vi suspektastion?—Respondis la tre sprita blindulo: ĉu vi scias kial mi pensas ke vi manĝis la vinberojn po tri? Ĉar mi ilin manĝis po du, kaj vi silentis.

Tradukis R. Codorniu.

mismo. Como ví que él quebraba la postura, no me contenté ir á la par con él: mas aun pasaba adelante dos á dos y tres á tres, y como podía las comía. Acabado el racimo, estuvo un poco con el escobajo en la mano, y meneando la cabeza dijo: Lázaro, engañado me has; juraré yo que has comido las uvas tres á tres. No comí, dije yo; mas ¿por qué sospecháis eso?—Respondió el graciosísimo ciego: ¿sabes en qué veo que las comiste tres á tres? en que las comía yo dos á dos y callabas. *Hurtado de Mendoza.*

Sciigoj

Sinjoro Emilo Duclaux, profesoro, direktoro de la «Instituto Pasteur», fervora patrono de l'esperanto, mortis.

Lia familia, la scienco, la esperantistaj ni ĉiuj ploras la necesan viron kiun ni perdis.

Ankaŭ mortis S.^o Stefano Bojkov membro de la Plovdiv-a Klubo.

Al lia familia kaj al la Bulgaraj esperantistoj ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.

Anglujo.—Ni ricevis duan numeron de «The Note-Book» (Aŭgusto), kiu gazeto estas decida protektanto de esperanto kaj enhavas kelkajn verkojn en nia kara lingvo. Antaŭen. Gratulaĵojn. Dankojn.

Ankaŭ alvenis al ni la dekan numeron (Aŭgusto) de «The Esperantist» kiel ĉiam bonege.

Austrujo, Bohemujo.—La n.^o 6 de «Cesky Esperantista» (Junio) sciigas al ni ke S.^o Macan, profesoro en bohema-germana Instituto por blinduloj de Praha, tie faras esperantan kurson, kombinita kun Braille'a sistemo.

Nun lernas fervore dudekdu gezor-

Noticias

El Sr. Emilio Duclaux, profesor, direktor del «Instituto Pasteur», fervoroso patrón del Esperanto, ha fallecido.

Su familia, la ciencia, los esperantistas todos lloramos al hombre necesario que hemos perdido.

También ha muerto el Sr. Esteban Bojkov, miembro del Club de Plovdiv.

A su familia y á los esperantistas búlgaros, damos nuestro más sentido pésame.

Inglaterra.—Hemos recibido el segundo número de *The Note Book* (Agosto), cuyo periódico es decidido protector del Esperanto y contiene algunas composiciones en nuestro querido idioma. Adelante. Felicitaciones. Gracias.

También llegó á nosotros el número 10 (Agosto) de *The Esperantist*, como siempre buenísimo.

Austria, Bohemia.—El núm. 6 de «Cesky Esperantista» (Junio) nos hace saber que el Sr. Macan, profesor del Instituto bohemio alemán para ciegos de Praha, hace en él un curso de Esperanto, combinado con el sistema Braille.

Ahora estudian fervorosamente vein-

gatoj kaj ĝoje interparolas blinduloj bohemaj kun siaj kolegoj germanaj.

Ne estis tiel ĝis nun, ĉar pro naciaj motivoj, bohemoj ne volis paroli lingvon germanan, nek germanoj lingvon boheman.

Belgujo.—«La Belga Sonorilo» n.º 23 (Julio) enhavas gravan leteron de sinjoro N. Kazi-Girej, kiu el Karbin detale rakontas la lastajn militfarojn kiuj okazis en tiu lando. Ni deziras tieajn pacajnsciigojn.

Bulgarujo.—Estas fondita en *Varna* esperantista klubo sub la nomo «Fraterco». Prezidanto: S.º G. Atanasov. Viceprezidanto: S.º J. J. Kutikov. Sekretario: S.º J. N. Korĉev. Kasisto: S.º St. Atanasov kaj konsilaro S.º D. K. Cervenakov.

En la fundo de tiu grupo tre laboris la konata advokato kaj bulgara diputato S.º Kr. Mirsci.

La 5^{an} de nuna monato en la loĝejo de la klubo estas malfermitaj du esperantaj kursoj, komenca kaj supra, gvidataj de S.º G. Atanasov kun helpo de de Sro. St. Atanasov.

La n.º 4 (Junio) de «Rondiranto» ankaŭ montras al ni la daŭrigon de esperanta propagando en tiu lando.

Franco.—La 10.^a n.º de «Espero Katolika» (Julio), inter aliaj kuriozaj sciigojn enpresas matematikan formulon por defini popularecon de ia gazeto.

La n.º 5 (Majo) de «Internacia Sciencia Revuo» enhavas belajn verkojn de sinjoroj Bourlet, Iĉet-Vericov, Driencourt, Benavente, Broca, Sulzer, Marchais, Corret, Rodet, Grünfeld, Schmidt, kaj aliaj scienculoj.

Lyon. Fraŭlino Zabilon d'Her diras al ni:

«Mi havas la plezuron de anonci al vi ke multaj personoj interesas sin pri nia lyona bonfarado. Jam mi posedas pli ol 630 lotaĵojn, sed nun ni devas disvendi 3000 biletojn! Kiel vi scias tre certe, la

te y dos pupilos de ambos sexos y alegremente conversan los bohemios ciegos con sus colegas alemanes.

Antes no era así, porque por motivos nacionales los bohemios no querían hablar la lengua alemana, ni los alemanes la lengua bohemia.

Bélgica.—«La Belga Sonorilo», número 23 (Julio) contiene una importante carta del Sr. N. Kazi-Girej, el cual desde Karbin refiere detalladamente las últimas acciones de guerra ocurridas en aquel país. Deseamos de allí noticias de paz.

Bulgaria.—Ha sido fundado en Varna un club esperantista con el nombre de «Fraterco» (fraternidad). Presidente, señor G. Atanasov; Vicepresidente, señor J. J. Kubiskov; Secretario, Sr. J. N. Korĉev; Cajero, Sr. Atanasov, y Consejero, Sr. D. K. Cervenakov.

En la fundación de este grupo ha bajado mucho el conocido abogado y diputado búlgaro Sr. Kr. Mirsci.

El 5 del mes actual, en el domicilio del club, se han abierto dos cursos, elemental y superior, dirigidos por el señor G. Atanasov con auxilio del señor St. Atanasov.

El núm. 4 (Junio) de «Rondiranto» también nos demuestra que continúa la propaganda del Esperanto en aquel país.

Francia.—El núm. 10 de «Espero Katolika» (Julio), entre otras curiosas noticias inserta una fórmula para determinar la popularidad de una publicación.

El núm. 5 (Majo) de «Internacia Sciencia Revuo» contiene bellas composiciones de los Sres. Bourlet, Iĉet-Vericov, Driencourt, Benavente, Broca, Suzler, Marchais, Corret, Rodet, Grünfeld, Schmidt y otros sabios.

Lyon.—La Srta. Zabilón, de Her, nos dice:

«Tengo el gusto de anunciar á usted que muchas personas se interesan por nuestra bienhechora obra lionesa. Poseo ya más de 630 lotes, pero ahora solamente debemos vender 3.000 billetes.

serioj de 5 biletoj havos almenaŭ unu gajnantan numeron.

Mi plezurege sciigas al vi ke la Rhona prefekto volante partopreni al nia bonfarado, sendis kun afabla letero, belegan bronzan artfaritaĵon: statuon reprezentantan «la ventego». Kiel mi tre deziris du oficialajn lotaĵojn, mi faras ankoraŭ paŝadoj ĉe la Lyon'an urbestron; mi atendas lian respondon, kiu tre certe estos favora.

Mi devas ankoraŭ sciigi al vi ke antaŭ du tagoj, mi ricevis mendon de 100 biletoj de... ŝia Moŝto Sved kaj Norveĝlanda Reĝino kiu interesiĝas pri tio kio oni povas fari por faciligi la vivadon de la malfeliĉaj blinduloj.

Jen kelkaj bonaj novaĵoj kiuj kuraĝigos la ŝanceliĝantojn aĉeti biletojn.»

Ni varmege rekomendas denove tiu belegagado, rememorigas ke ĉia bileto kostas unu frankon kaj ke dank'al la granda nombro da ricevitaj lotaĵoj oni povis defini ke estos almenaŭ en ĉia serio po kvin biletoj, unu gajnanta bileto.

Oni adresu la mendoj rekte al Fraŭlino Zabilon d'Her, 33 rue Sala, *kun kun mandato*.

Charenton. Esperantista grupo estis tie fondita sub la nomo de «Grupo esperantista de l kantono de Charenton. La Prezidanto estas S.^o Devoucoux, licenciato de leĝacienco kaj la sekretario Sinj. L. Rigovi, licenciato de literaturo.

«L'Esperantiste» n.^o 7 (Julio) diras al ni:

Pro la kongreso de *L' Association française pour l'avancement des sciences* okazonta en Grenoble, la oficejo de la grupo esperantista de Parizo estos fermata dum tiu ĉi monato. Oni volu, sendi nun nenian mendon de libroj al la Parizo grupo.

Peronne. Oni fondis, definitive grupon, Prezidanto, Sro. A. Debray. Sekretario, Sro. E. Leroy.

Provins. La membroj preparas por la aŭtuno malgrandan feston, dum kiu oni ludos en esperanto «La advokato

Como usted bien sabe, las series de cinco billetes tendrán al menos un premio.

Con gran satisfacción manifiesto á usted que el prefecto del Ródano, queriendo tomar parte en nuestra obra bienhechora, envió con amable carta un hermoso bronce de arte; una estatua que representa la tempestad. Como yo deseo mucho dos lotes oficiales, sigo dando pasos para con el alcalde de Lyon; espero su respuesta, que seguramente será favorable.

Debo también enterar á usted de que hace dos días recibí un pedido de 100 billetes de S. M. la Reina de Suecia y Noruega, que se interesa por lo que se puede hacer para facilitar la existencia de los infelices ciegos.

Estas buenas noticias animarán á los vacilantes á tomar billetes.»

Recomendamos de nuevo y con gran interés esta hermosa obra, recordamos que cada billete cuesta un franco, y que gracias al gran número de lotes recibidos se ha podido asignar que haya al menos en cada serie, de cinco billetes, uno premiado.

Diríjense los pedidos directamente á la *Srta. Zabilón d' Her*, 33, rue Sala, *con documento de pago unido*.

Charenton.—Ha sido formado allí un grupo esperantista, bajo el nombre de «Grupo Esperantista del cantón de Charenton». El presidente es el Sr. Devoucoux, licenciado en Derecho, y el Secretario el Sr. L. Rigovi, licenciado en literatura.

«L'Esperantiste» número 7 (Julio), nos dice:

«A causa del congreso de *L' Association Française pour l'avance des sciences* que tendrá lugar en Grenoble, las oficinas del grupo esperantista de París estarán cerradas durante este mes. Se suplica no se haga ahora ningún pedido de libros al grupo de París.

Peronne.—Se ha fundado, definitivamente, un grupo. Presidente, Sr. A. Debray; Secretario, Sr. A. Leroy.

Provins.—Los miembros preparan para el otoño una pequeña fiesta, durante la cual se representará en Esperanto «El

Patelin». Ili ankaŭ intencas organizi manĝanĝon. Dum ambaŭ aktoj la internacia lingvo estos devigata.

Calais. Sro. Guyot prezidanto de tiea grupo sciigas al ni per ĝentila cirkulero ke je Pokazo de la kurado de aŭtomobilaj boatoj inter Calais kaj Dovero okaza Internacia konkroso d'esperanto kaj la grupoj de la nomataj urboj akceptos plezure la esperantistojn kiuj tie kunvenos.

Germanujo. La n.^o 6-7 (Jul.-Aŭg.) de «*Esperantaj Sciigoj*» raportas pri esperantaj progresos en lia lando. Jen estas.

Altona. Sub la titolo «*Esperantista grupo en Hamburgo, oni fondis grupon.*» Prezidanto kaj fundanto: Sro. Mybs. Sekretario, Sro. Lindinger. Kasisto. Sinjoro Roloff.

Hanovro. S.^{oj} Wallon, Elbl, Stubbe, Luce kaj Meine, laboradas por tie krei grupon.

Hildesheim. Oni klopodas por la fundo de grupo

Stuttgard. Profesoro Christaller daŭrigas sian fervoran propagandon.

Konisberg. Dro. Ebner organizis malgrandan propagandan ekspozicion de esperantajoj.

Schlesvoig. Sro. Niemeyer tre interesiĝis pri esperanto en la gazeto «*Schleswiger Anzeiger.*»

Berlino. Tiea grupo dissendis klarigajn presaĵoj pri esperanto al pli ol mil lokoj de somera restado kaj al ĉiuj banurboj de Germanujo kaj Austrujo-Hungarujo.

Holando.—«*Revuo Internacia de Stenografio*» n.^o 2 (Aprilo-Majo-Junio) inter aliaj gravaj aferoj enpresas cirkuleron de Sro. Süssmuth Oscar Triesons Tidningskontor Sodertelge (Sverige) por la disvastigo de «*Societo Internacia de Esperantistoj*».

Italujo.—La n.^o 6 (Aprilo-Majo) de *L'Esperantista* aliĝas al la protesto de

Abogado Patelin». También intentan organizar un almuerzo. Durante ambos actos la lengua internacional será obligada.

Calais.—El Sr. Guyot, presidente del grupo de aquella localidad, nos manifiesta en atenta circular que con motivo de la regata de embarcaciones de automóviles entre Calais y Dover, tendrá lugar un Congreso Internacional de Esperanto, y los grupos de las citadas poblaciones aceptarán con gusto á los Esperantistas que allí concurren.

Alemania.—Los números 6 y 7 (Julio-Agosto) de «*Esperantaj Sciigoj*» dan noticias de progresos del Esperanto en su país. Hélos aquí:

Altona.—Bajo el título «*Esperantista grupo en Hamburgo-Altona*» se ha fundado un grupo. Presidente y fundador Sr. Mybs, Secretario, Sr. Lindinger; Cajero, Sr. Roloff.

Hannover.—Los Sres. Wallon, Elbl, Stubbe, Luce kaj Meine, trababan para crear allí un grupo.

Hildesheim.—Se dan pasos para la fundación de un grupo.

Stuttgard.—El profesor Christaller continúa su fervorosa propaganda.

Konisberg.—El Dr. Ebner ha organizado una pequeña exposición propagandista de objetos de esperanto.

Schlesvoig.—El Sr. Niemeyer se interesa mucho por el Esperanto en el periódico *Schleswiger Anzeiger.*

Berlin.—Aquel grupo ha repartido impresos explicativos del Esperanto á más de mil localidades veraniegas y á todas las poblaciones balnearias de Alemania y Austria-Hungría.

Holanda.—«*Revuo Internacia de Stenografio*», núm. 2 (Abril-Mayo-Junio), entre otros importantes asuntos inserta una circular del Sr. J. Süssmuth Oscar Triesons Tidningskontor Sodertelge (Sverige) para la difusión de «*Societo Internacia de Esperantistoj*» (*Sociedad internacional de esperantistas*).

Italia.—El núm. 6 (Abril-Mayo) de *L'Esperantista* se adhiere á la protes-

Sro. Beaufront kiun publikigas nia 8.^a numero.

Meksiko.—Tie daŭrigas la progresadon de esperanto, laŭ «La Meksika Lumturo» (Majo-Junio) kiu ankaŭ enhavas aliĝon al la protesto de Sro. Beaufront, en Aprila numero de «L'Esperantiste».

Peruo.—Laŭ la n.^o 11 de «Antaŭen esperantistoj!!» (Majo) Sro. R. G. Abril, profesoro de esperanto ĉe «Instituto Comercial» de *Ciclayo* verkis belan broŝureton kie faras koni esperanton, ĝian strukturon, facilecon, gravecon kaj disvastigon: li ĝin disdonas senpage.

Rusujo.—Sinjoro doktoro Ostrowki, el Jalta (Rusujo), sciigas al ni, ke post multaj klopodoj, li sukcesis ricevi permeson de la rusa registaro por publikigo de rus-esperanta gazeto.

Tiu ĉi nova propagandilo eliros du fojojn ĉiumonate sub la nomo: *Esperanto*. Abonkosto estas: 8 francos por jaro. Por peto pri abonoj oni povas sin turni al Sro. Carlo Bourlet, 22, *avenue de l'Observatoire Paris*.

Ni deziras al la nova gazeto plej brilan sukceson kaj longedaŭron vivadon kaj ni ne dubas ke ĝi estos potenca ilo kiu multe kunhelpos al la rapida disvastigado de nia afero en Rusujo, nacio kie naskiĝis nia kara lingvo.

Hispanujo.—En *Gallarta*, sinjoro Rufino Unzaga daŭrigas sukcese sian esperantan kurson.

«El Magisterio de Teruel», *Teruel-a* gazeto enhavas belan artikolon de la entuziasma esperantisto sinjoro Joakino R. Villarroya, titolita «Esperanto! kio tio estas?»

«El Productor», gazeto el *Barcelona*, sub la titolo *Nova lingvo*. »Esperanto», skribas longan kaj laŭdindan artikolon rekomendantan la lernadon de nia kara lingvo.

ta del Sr. Beaufront que publica nuestro número 8.

Méjico.—Continúa allí el progreso del Esperanto, según «La Meksika Lumturo», que también contiene adhesión á la protesta del Sr. Beaufront, en el número de Abril de «L'Esperantiste».

Perú.—Según el núm. 11 de «Antaŭen Esperantistoj» (Majo), el Sr. R. G. Abril, profesor de Esperanto del Instituto Comercial de *Chiclayo* ha compuesto un bonito folleto en el que da á conocer el Esperanto, su estructura, facilidad, importancia y extensión; lo reparte gratis.

Rusia.—El Sr. Dr. Ostrowski, de Jalta (Rusia), nos da la noticia de que después de muchos pasos ha conseguido permiso del Gobierno ruso para la publicación de un periódico ruso-esperanto.

Este nuevo instrumento de propaganda saldrá dos veces al mes con el nombre de *Esperanto*. El precio del abono es: 8 francos por año. Los pedidos de abono pueden dirigirse al Sr. Carlo Bourlet, 22, *Avenue de l'observatoire, Paris*.

Deseamos al nuevo periódico el más brillante éxito y larga vida, y no dudamos que será poderoso instrumento que mucho ayudará á la rápida difusión de nuestro asunto en Rusia, nación donde nació nuestra querida lengua.

España.—En *Gallarta* el Sr. D. Rufino Unzaga continúa con éxito su curso de Esperanto.

«El Magisterio de Teruel», periódico de *Teruel*, contiene un hermoso artículo del entusiasta esperantista D. Joaquín R. Villarroya, titulado «¡Esperanto!, ¿qué es eso?»

«El Productor», periódico de *Barcelona*, bajo el título *Nuevo idioma*. «El Esperanto», escribe un largo y laudable artículo, recomendando el estudio de nuestro querido idioma.

EL BECQUER

Naskiĝas ni kiam ekbrilas fulmo,
Daŭras ankoraŭ ĝi kiam ni mortas,
Kiel mallonga vivi!

Gloro kaj am' post kiuj ni alkuras
Estas nur ŝonĝa ombr' de ni celita
Mort'estas elvekiĝ!

Esperantigis V. I.

Pri la vilaĝano kiu havis

ĉevalon por vendi

(FRANCA FABELO)

Vilaĝano havis ĉevalon kaj postulis por ĝi dudek monerojn. Najbaro sin prezentas por aĉeti ĝin; sed, ĉar li ne povas konsenti pri la prezo, li proponas ke la besto estu kondukota al la vendejo kaj ke li donos tiom kiom oferos la unua aĉetonto — La kondiĉo estas akceptata kaj la ĉevalo elmontrata por la vendo. Alvenas unuokululo kiu oferas dek monerojn. Laŭ tiu ĉi propono kaj la akceptita kondiĉo, la najbaro volas kunpreni la beston; la vilaĝano kontraŭstariĝas: granda disputo, kaj proceso antaŭ la juĝistaro.

La aĉetinto malvolvas, antaŭ la juĝistoj, siajn klarigojn, la unua.

—Sinjoroj—respondas la vilaĝano—«mi ne neas la kondiĉon pri kiu parolis la alia partio, sed tiu kiu estimis mian beston, havas nur unuokulon, kaj povis do vidi nur la duonon de tio kion ĝi valoras. Mia kontraŭulo havas ja du bonajn okulojn: mi do petas la duoblon, se ne, mi rekondukos la ĉevalon hejmen».

La juĝistoj ridis pro lia respondo, kaj forsendis lin kun lia ĉevalo.

TRADUKIS L. COGEN.

De un aldeano que tenía

un caballo para vender

(CUENTO FRANCÉS)

Un aldeano tenía un caballo y pedía por él veinte monedas. Un vecino se presentó á comprarlo; pero por no haberse avenido en el precio, propuso que el animal fuese conducido al mercado y que daría lo que ofreciera el primer comprador. La condición fué aceptada y el caballo presentado para la venta. Llegó un tuerto que ofreció diez monedas. Según esta proposición y la condición aceptada, el vecino quiso llevarse la bestia, el aldeano se opuso á ello: gran disputa y litigio ante el juez.

El comprador desarrolla el primero ante el juez sus explicaciones.

—Señores—responde el aldeano—«yo no niego la condición de que ha hablado la otra parte, pero el que apreció mi bestia sólo tiene un ojo; sólo pudo, pues, ver la mitad de lo que vale. Mi contrincante tiene en realidad dos buenos ojos: pido, pues, el doble, si no, me vuelvo á llevar el caballo á casa».

El juez rió de la respuesta y le despidió con su caballo.

Spritaĵoj

En la sanktaveŝtejo de popola preĝejo:

—Edzigitu kun...

—Kun virino.

—Kompreneble, kiel ĉiaj.

—Ne, sinjoro; mi havas fratinojn edzigitajn kun viro.

—Ĝi kien vi iras, viro, kuregante tiama-niere?

—Okazas ke mia bopatrino falis en riveron kaj mi iras ŝin savi.

—Kien ŝi falis?

—Tien mem.

—Kaj kial vi alkuregas laŭ kontraŭa direkto je la akva alfluo.

—Jes, viro, jes; ĉu vi ne scias ke mia bopatrino faras ĉion kontraŭe?

Spiritista dialogo:

—Ĝu estas la spirito de mia edzo, kiu ĉeestas?

—Jes—respondas voĉo.

—Diru al mi, karulo mia, ĉu vi estas feliĉa?

—Multe, jes, multege.

—Ĉu multe pli ol kiam vi vivis apud mi

—Jes, edzino mia, jes.

—Kaj kie vi estas, nun?

—Ĉe la kvina infero!!!

L. S. B.

Oportunidades

En la sacristía de una iglesia de pueblo:

—Casado con...

—Con una mujer.

—Naturalmente. Como todos.

—No, señor, yo tengo una hermana casada con un hombre.

—¿Adónde va usted, hombre, corriendo de esa manera?

—Me ocurre que mi suegra cayó al río, y voy a salvarla.

—¿Dónde cayó?

—Allí mismo.

—¿Y cómo usted corre rápidamente en dirección contraria a la corriente?

—Sí, hombre, sí. ¿No sabe usted que mi suegra hace todo en contra?

Diálogo espiritista:

—¿Es el espíritu de mi marido el que está presente?

—Sí—responde una voz.

—Dime, querido mío, ¿eres feliz?

—Sí, mucho, muchísimo.

—¿Mucho más que cuando vivías cerca de mí?

—Sí, esposa mía, sí.

—¿Y dónde estás ahora?

—¡En el quinto infierno!!!

Hispanaj proverboj

Foresto naskas forgeson.

Mono, ĉion atingas.

Kiu ŝatas danĝeron en ĝi pereos.

Kia vivo, tia morto.

Kiu serĉas, trovas.

Kiu silentas, konsentas.

Ne estas resaniĝo tiel rapida kiel vundiĝo.

Pli valoras unu *prenu* ol du *mi donos*.

Kiu malmulte havas, malmulte timas.

Hundo, kiu bojas, ne mordas.

Ne estas leĝoj por bezono.

Homo proponas kaj Dio disponas.

Kiu multe ĉirkaŭprenas malmulte premas.

Kiu pruntedonas al amiko por si naskas malamikon.

Proverbios españoles

Ausencias causan olvidos.

Todo lo alcanza el dinero.

Quien ama el peligro en él perece.

Tal vida, tal muerte.

Quien busca, halla.

Quien calla, otorga.

No es tan pronta la cura como la herida.

Más vale un *toma* que dos *te daré*.

Quien poco tiene, poco teme.

Perro que ladra no muerde.

La necesidad carece de ley.

El hombre propone y Dios dispone.

Quien mucho abarca poco aprieta.

Quien presta al amigo cobra un enemigo.

Ce kavaliroj

Amiko! Kiel vi povas vendi viajn balailojn po dek centimoj ĉiu? Mi forrabis kanojn, ŝnureton kaj palmobranĉojn kaj mi faris malriĉan aferon vendante ilin po dek-kvin.

Malsaĝulo! Mi ilin forrabis jam kons-truitaj.

A. J. L.

Entre caballeros

Entre caballeros:

—¡Amigo! ¿Cómo puede usted vender sus escobas por diez céntimos cada una? Yo robo las cañas, el cordel y la palma, y hago un mal negocio vendiéndolas á quince.

—¡Tonto! Yo las robo hechas.

Amuzajoj

XIV. Oni metu saman literon sur ĉion punkton de la sama kolono kaj ni ricevos.

- . a . . . korpan parton
- . e . . . subteran ĉambro
- . i . . . ŝipan parton
- . o . . . korpan parton
- . u . . . insekton

XV. Tria unua estas vokalo — dun tria estas arbo—unua dua tria unua estas viro.

XVI.

konsonanta litero	pronomo
-------------------	---------

SOLVOJ



De la XI.

Mi ne scias kion havas
la floroj de la tombejoj;
al mi ŝajnas ili ploras
kiam movas ilin vento.

De la XII. — Neniu.

De la XIII. — Telero.

L. S. B.

Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

SINJOROJ:

- J. B. G.*—*Granada (Hispanujo)*.—Mi ricevus poŝtmarkojn kaj abonis al vi, de Julio, al «L. B. de L. I.», kiu rekte estos sendita al vi.
- J. L. B.*—*Coruña (Hispanujo)*.—Mi sendis al vi du programojn de Valenca foiro.
- F. R.*—*Sevilla (Hispanujo)*.—Mi ricevis poŝtmarkojn por via abono kaj sendis al vi la numero 10.
- L. R.*—*Charenton (Francujo)*.—Mi ricevis, utiligis kaj tre dankas, viajn sciigojn.
- P.*—*Fontainebleau (Francujo)*.—Mi plenumas vian deziron sendante al vi tiun el ekzempleron de L. S. H.
- A. E. L.*—*London (Anglujo)*.—Mi sendis al vi la paperojn de vi dezirataj laŭ via estis mata poŝtkarto.
- O. M.*—*Halle (Germanujo)*.—Sekve al via gentila poŝtkarto mi sendas al vi tiun ĉi numeron de L. S. H.
- F.^{ino} O. F.*—*Erfurt (Germanujo)*.—Mi ricevis vian ĝentilan kaj belan poŝtkarton kaj mi plezure plenumis vian deziron.
- W.*—*Atter (Belgujo)*.—Mi plenumas vian deziron, sendante al vi tiun ĉi pruvan numeron.
- K. Frateco*—*Varna (Bulgarlando)*.—Mi plenumas vian peton. Gratulaĵojn.
- J. T.*—*Desterreich (Anstrujo)*.—Mi ricevis vian belan ilustritan poŝtkarton. Dankojn. Miaj multaj okupaĵoj ne lasas al mi tempon liberon por amuza korespondado.—Pardonu.—Mi anoncas vian deziron.
- E.*—*Bourges (Francujo)*.—Mi anoncas vian deziron kaj dankas viajn bondezirojn. Niajn reciprokecojn.
- L. L.*—*Calais (Francujo)*.—Mi ricevis tri frankojn je poŝtmarkoj por jarabono de via grupo. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

Anglujo. «La Esperanta Eldonanta Kompanio.»

Tiu ĉi kompanio estas fondita de la bonkonata Fermo de Edukistoj. Sinjoroj Hat-chard kaj de Castarede. Is High Holborn, Londono. La ĉefa celo de la fondintoj estas la disseminado de Esperanto tra Granda Brituyo kaj ĝiaj Kolonioj Antaŭ tri monatoj, laŭ la propono de Sro. O'Connor, la direktoroj de tiu ĉi Fermo aldonis esperanton al ilia instruajaro, kun la rezulto ke pli ol 500 gelernantoj nun ricevas «Lecionojn por korespondado en la lingvo.

La kompanio havas kelkajn verkojn en preparado, inter aliaj «Primer of Esperanto» de kiu 100.000 ekzempleroj aperos baldaŭ. Tiu ĉi libreto estas verkita de Sro. O'Connor. Ph. D. B. A. (aŭtoro de «Complete Jext-Book»). La kosto estas nur unu penco kaj jam estas ricevita miloj da mendoj. La fondo de tiu ĉi kompanio estas epokfaranta tago por Esperanto en la Angla-parolante mondo, kaj nature ĝi havas multajn imitantojn.

Sro. Esselin, Conseiller de Prefecture—4 rue des Armurieres—Bourges (Francujo). Deziras, por propaganda celo, ricevi kelkaj linioj esperante skribitaj.

Komercistoj kaj direktoroj de gazetoj, kiuj dezirus **Representanton en Holando.** Sin turni al *Sinjoro S. de Uries. Amsterdam, Damstr. 24.*

Sro. Fursky T. stud. gym. Wien VII, Westbanstr, 3, Desterreich (Austrujo). Deziras intersanĝi poŝtkartojn ilustritajn de urbaj vidajoj kaj ke oni englutu al ili diversajn markojn.

Sinj. G. Perrin, 8 rue de Rome, Calais (Francujo).—Deziras intersanĝi poŝtkartojn esperante skribitajn.

Fraŭlinoj Mennig, 26, ST. DE PARME 26. St. Gilles - Bruzelles.—BELGUJO.

Pensio por fraŭlinoj kiuj en diversaj ernejoj de Bruselo sekvas kursojn de:	}	Supera instruado Franca lingvo Muzic.—pentr.—desegnartoj.
--	---	---

Bulletin de la Societé des Sciences naturelles et d'enseignement populaire de Tarare—Paraissant le 15 de chaque mois—Prix du numero: 50 cent.

EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14

Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad, como igualmente de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

Diccionario Esperanto-Español de raíces, una peseta; Gramática, 0'75; cuadro de palabras correlativas, 0'10; enumeración y significado de los afijos, 0'25; ejercicio de traducción, 0'50. — **Reydo. P. ANTONIO GUINART** — ESCUELAS PÍAS — VALENCIA.

La Administración de este periódico admite suscripciones, en valores ó sellos de correo españoles, á los periódicos esperantistas: *Internacia Scienco Revuo* — *Lingvo Internacia*. — *Societo por internaciaj rilatoj*. — *Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia*. — *Kondiranto y La Meksika Lumturo*.

L'Esperantiste oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societ. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France*.

LONDONO Pensio por gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvoj. **Sinjorino O'CONNOR**, *Esperanto House, St-Stephen's Sq., Bayswater, 10*.

MANUAL Y EJERCICIOS DE LA LENGUA INTERNACIONAL
ESPERANTO, POR INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA. Precio: **3 pesetas**. — En las principales librerías de España y América y en la administración de este periódico.

La vivado en Port-Artur dum la milito ruso-japana, letero de tie-estanto;
La Sudafrikaj hereroj;
Evolucio de la monda komercado kompare kun sciencaj eltrovoj dum la XIX^a centjaro.

Multaj literaturaj artikoloj estas nun legeblaj en la monata revuo

«LINGVO INTERNACIA»

Jare: 4 francoj. Kun literatura aldono: 6 1/2 francoj. — Prova trimonata abono: 1 fr. 25. — 27, *Boulevard Arago 27, Paris*
aŭ ĉe gazeto LA SUNO HISPANA — 5, Corona — Valencia (España).